# tejo:aktuale

n°504 | Majo 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon. Jen via raporto pri la plej freŝaj novaĵoj de la TEJO-mondo**. Baldaŭ alvenas somero—la kongresa sezono. Paku la dorsosakon kaj ek' al nova renkontiĝo! Dum vi atendas trajnon, legu tiun ĉi numeron de **TEJO-aktuale** kiu informas vin pri la novaj alvokoj, eventoj kaj aliaj novaĵoj en la TEJO-mondo.

## ALVOKOJ




### Iĝu la nova redaktoro de *Kontakto*

TEJO invitas aktivulojn kandidatiĝi por iĝi la nova redaktoro de *Kontakto*. Esti redaktoro signifas ne nur certigi la altan eldonkvaliton de la revuo, sed ankaŭ samtempe profesie kaj movade pliriĉiĝi. La redaktado okazas virtuale (laŭ la preferataj rimedoj de la dungito), do homoj el ĉiuj landoj povas kandidatiĝi. **Kandidatiĝu tuj por iĝi redaktoro de *Kontakto*!**

Legu la plenan alvokon kaj kandidatiĝu **ĝis la 15-a de junio!**




### Financa subteno al junuloj de Azio kaj Oceanio por IJK 2025

Lasta ŝanco por ricevi financan subtenon por partopreni la plej mojosan kaj grandan junularan eventon de 2025! La limdato de la konkurso "Partoprenu IJK-n" 2025 estas **plilongigita ĝis la 9-a de junio**. Se vi loĝas en landoj de Azio aŭ Oceanio, estas individua membro de TEJO (ĝis inkluzive 35 jarojn) kaj emas helpi en la kongreso, ĉi tiu konkurso estas por vi!

LASTA ALVOKO! Legu pli en nia retejo.

## EVENTOJ

### Poskongresaj ekskursoj

## post UK




Partoprenu la postkongresan ekskurson kaj **vizitu tri landojn en kvin tagoj** – la vinurbon Znojmo en Ĉeĥio, Bratislavon en Slovakio kaj Vienon en Aŭstrio.

Dum la vojaĝo vi vizitos la artverkon de Alfons Mucha, gustumos lokajn vinojn, kaj esploros mirindajn kastelojn, mondfamajn ĝardenojn kaj historiajn urbocentrojn. La programo inkluzivas loĝadon en komfortaj 4-stelaj hoteloj, manĝojn kun lokaj specialaĵoj, ĉiujn bezonatajn biletojn, transporton kaj gvidadon en Esperanto.

La ekskurso komenciĝos la **2-an de aŭgusto en Brno, kaj finiĝos la 6-an de aŭgusto en Vieno.** Sekvu la UK-on en Instagram, Facebook kaj Telegram por resti ĝisdata!

## La plej bunta muzika programo en FESTO




Oni diras, ke dum FESTO okazos festoj kun la plej frenezaj muzikistoj. Venu al **FESTO!**

Post pli ol jardeklonga paŭzo, FESTO revenas. Ĝi okazos de la **17-a ĝis la 24-a de aŭgusto en Moissac**, Francio. Ĝin organizas la **Junulara Esperanta Franca Organizo** (JEFO) kun muzika programo aranĝita kun **EUROKKA**. Sekvu nian progreson kaj la detalojn ĉi tie kaj Telegrame!

## Medicino kontraŭ postkongresa sindromo: FAJRO 2025




Ĝis 9 el 10 kuracistoj konfirmas ke la plej bona maniero eviti la postkongresan sindromon estas tuj poste partopreni alian Esperanto-eventon.

Tial, Filipina Esperanto-Junularo (FEJ) organizas **Filipinan Junularan Renkontiĝon (FAJRO) 2025**, kiu okazos **de la 22-a ĝis la 24-a de aŭgusto** (mallonge post IJK 2025) en la marborda urbeto Lian. Plaĝumu, kantu, kaj faru historion kun ni ĉar FAJRO 2025 estos nia unua internacia renkontiĝo!

Jam eblas aliĝi! La unua aliĝperiodo daŭras ĝis la 15-a de junio. Detaloj troviĝas en nia nova retejo. Aliĝu al nia

babilgrupo kaj sekvu nin en Instagram aŭ Facebook.




## Ek' al ekskursoj dum IJK!

La Kongresa Komisiono organizas por vi ekskursojn por vidi la malsamajn flankojn de Indonezio antaŭ, dum kaj post IJK.

Entute okazos naŭ ekskursoj: du antaŭkongresaj, kvar dumkongresaj kaj tri postkongresaj. Ne maltrafu vian ŝancon vidi la belecon de la regiono. Rezervu viajn lokojn tuj!

Detaloj kaj aliĝilo estas en nia retejo.




## Karavanumu al IJK kaj reen!

Ĉu vi emas vojaĝi kun aliaj esperantistoj al IJK? Vi estas en la ĝusta loko!

Kadre de IJK 2025 en Indonezio, la Kongresa Komisiono preparis specialan transporton por plifaciligi la moviĝon de kongresanoj inter la ĉefurbo Ĝakarto kaj la kongresejo, Alfa Resort Hotel & Conference en Cisarua, kaj reen.

Detaloj kaj aliĝilo estas en nia retejo.




## Kion ni faros dum IJK?

Vi povas iĝi parto de la plej granda, plej mojosa, kaj plej internacia junulara evento de la jaro: IJK 2025 en Cisarua, Indonezio **de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto!** Proponu programeron kaj helpu pliriĉigi la enhavon de la kongreso.

Legu plian informon en la retejo.

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

# ANONCOJ




## TEJO kaj FoJE kune luktas kontraŭ internacia lingva diskriminacio

La 9-an kaj 10-an de majo 2025 en Bruselo, kadre de la Ĝenerala Asembleo de Forumo Junulara Eŭropa – FoJE (anglalingve: European Youth Forum), kuniĝis reprezentantoj de pli ol sepdek internaciaj junularaj organizoj kaj naciaj junularaj konsilioj por realigi la Ĝeneralan Asembleon, en kiu ili kaj aprobis kaj adoptis mocion proponitan de TEJO nomatan

***Pritraktado de Lingva Diskriminacio en Internacia Junulara Moviĝeblo kaj Partopreno***, prezentitan kaj defenditan de du TEJO-reprezentantoj: Lucía Montserrat Fernández Barrera kaj David Ruíz Sánchez.

Legu artikolon pri la mocio kaj la mocion.





...




♈ Via energio brilas dum ĉi tiu monato! Ĉu vi urĝe planas komenci novan Esperantan podkaston aŭ finfine lanĉi tiun TikTok-kanalon pri gramatikaj konsiloj? Junio donas al vi ŝancon gvidi, sed atentu: via pasio pri "ĝustaj tradukoj" povus instigi, ke vi korektu ĉiujn en via Telegram-grupo. Lasu iom da spaco por aliaj opinioj... almenaŭ kelkfoje.




♉ Junio estas via monato por finfine organizi tiujn PDF-dosierojn de "Kontakto" kiujn vi kolektas dum jaroj (ni ĉiuj scias, ke vi havas ilin!). Venuso en la flanko de komunikado signifas, ke viaj longaj, pripensitaj respondoj en Telegram-grupoj ricevos pli da etaj koroj ol kutime. Estu singarda kun viaj perfektismaj tendencoj kiam vi redaktas Vikipedion—jes, gravas, ke ĉiu komo estu ĝusta, sed foje "sufiĉe bona" vere sufiĉas.




♊ Karaj Ĝemeloj, via tempo alvenis! Via natura kapablo salti inter kvin malsamaj temoj en unu konversacio finfine estos aprezita (almenaŭ en la pli kaosaj Telegram-grupoj). Merkuro, via reganta planedo, dancos tra la sektoro de kreemo, do ne surpriziĝu se vi subite ekos skribi poezion aŭ krei TikTok-videojn pri prepozicioj. La dua semajno alportas perfektan momenton por lanĉi tiun podkast-ideon kiun vi havas—nur certigu ke vi havas almenaŭ tri epizodojn antaŭ ol

vi anoncos ĝin al la tuta mondo. Zorgu pri via tendenco komenci dek novajn projektojn samtempe!




♋ Via naskiĝtag-sezono komenciĝos kun dolĉa energio de novaj komencoj! Ĉi tiu junio invitas vin eliri el via komforta angulo (kaj de via preferata Esperanto-forumo) por esplori novajn manierojn esprimi vian kreemon. La luno, via reganta astro, pleniĝas je la fino de la monato, alportante klarecon pri tiu granda decido kiun vi prokrastas jam semajnojn—ĉu aliĝi al la plej mojosa junulara kongreso. Emociaj ligoj kun la komunumo fariĝos pli fortaj, precipe kun tiuj kiuj kunhavas vian amon por mapoj.




♌ Via somera energio komencas varmiĝi, kaj ĉiuj povos senti vian ĉeeston en ĉiu virtuala renkontiĝo. La suno (via reganta astro, kompreneble) lumas sur viaj komunikadaj talentoj, farante vin la perfekta kandidato por prelegi en la venonta kongreso—aŭ almenaŭ por esti tiu persono kiu proponas kvar malsamajn temojn kaj poste ne povas elekti. Evitu vian tendencon superregi diskutojn pri lingvopolitiko—lasu aliajn ankaŭ paroli! Konsileto: Via natura karismo helpas, sed foje la plej bona maniero brili estas helpi aliajn fari same.




♍ Perfekta tempo por zorgi pri viaj gravaj projektoj, inkluzive de reviziado de ĉiuj novaj artikoloj en Vikipedio por certigi, ke ili sekvas la ĝustajn formojn de citaĵoj. Atentu ne tro droni en perfektemo pri malgravaj aferoj—jes, "YouTube" kontraŭ "Jutubo" estas valida diskuto, sed eble vi ne bezonas korekti ĉiun uzanton.




♎ Junio invitas vin uzi vian talenton vidi ĉiujn flankojn de argumento, precipe kiam la diskutoj pri inkluzivaj pronomoj denove eksplodos. Venuso, via reganta planedo, dancos tra la sektoro de rilatoj, kreante perfektajn okazojn por konektiĝi kun homoj de malsamaj landoj kaj generacioj en la komunumo. Konsileto: Ne provu plaĉi al ĉiuj—foje vi devas elekti flankon, kaj tio estas tute bona.




♏ Intenseco kaj mistero: tio estas via specialaĵo, kaj junio donas perfektan scenejon por viaj profundaj pensoj. Via natura instinkto por esplori la kaŝitajn angulojn de la Esperanto-movado kondukos vin al fascinaj malkovroj—eble vi trovos novajn historiajn dokumentojn aŭ

malkovros bonegan Esperanto-muzikiston. La mezo de la monato alportas ŝancon por alporti ŝanĝojn en komunuma projekto. Estu singarda pri via tendenco vidi konspiraĵojn kie estas nur simple malbona organiziteco.




♐ Aventur-spiritaj sagitarioj! Jupitero, via reganta planedo, kuraĝigas vin esplori novajn horizontojn—eble estas tempo finfine lerni tiun alian planlingvon pri kiu vi ĉiam scivolemis, aŭ esplori kiel Esperanto estas uzata en tiuj landoj kiujn vi neniam antaŭe konsideris. La unua semajno de junio estas perfekta por plani tiun grandan vojaĝon al la ĉi-jara kongreso. Sed zorgu—via tendenco promesi ĉeeston ĉe kvin malsamaj eventoj en la sama semajnfino bezonas iom da realisma planado. Lasu spacon por spontaneaj aventuroj, sed ankaŭ por dormi!




♑ Vi estas la fidinda laboristo de la Esperanta komunumo: vi organizas retajn eventojn, helpas pri la teknikaj problemoj, kaj eĉ provas konvinki homojn uzi pli profesiajn foto-fonojn dum Zoom-kunvenoj. Sed junio atentigas pri ekvilibro. Ĉu vi vere bezonas esti la persono kiu ĉiam solvos ĉiujn problemojn? Lasu aliajn ankaŭ kontribui.




♒ Vi havas radikalajn pensojn: vi lastatempe decidis, ke la tuta Esperanta movado bezonas novan strategion por sociaj retoj. Junio estas perfekta tempo por prezenti viajn revoluciajn ideojn pri "Esperanto 3.0" aŭ kiel ajn vi nomas vian vizion. Nur atentu, ke ne ĉiuj pretas por viaj brilaj ŝanĝoj... almenaŭ ne tuj.




♓ Ĉi-monate vi sentas vin inspirita kaj kreema—ĉu vi finfine komencos tiun podkaston pri Esperanta literaturo? Eble. Ĉu vi trovos homojn por toleri viajn improvizajn sesiojn pri poezio dum malfruaj vesperoj en retkunvenoj? Nu, eble ne tiom facile. Sed ne gravas: daŭrigu la revon, ĉar unu tagon viaj projektoj povus fariĝi komunumaj klasikaĵoj.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands